

THE BRITISH ESPERANTIST

WITH WHICH IS INCORPORATED

INTERNATIONAL LANGUAGE

Vol. XXVIII, No. 327.

July, 1932.

LA 23a BRITA ESPERANTISTA KONGRESO

Laŭ invito de lia urbestra moșto la 23a Brita Kongreso okazis en Southport je Pentekosto. Anigis 300 gesamideanoj, kiu, kiel gasto de la civito, ricevis senpagajn biletajn por la tenis- kaj golf-ludejoj, subĉiela banejo, orkestrejo, k.t.p. Eĉ pri la vetero lia moșto aranĝis, do (krom pluveto dimanĉvespere) la vetero en Southport estis belega, dum multaj aliaj urboj preskaŭ dronis sub pluv-ŝtormoj.

Alveninte en la akceptejon vendredvespere, oni trovis tie aron da helpemaj Southportanoj, kaj ricevis la kongrespakajon, kiu enhavis la kutimajn biletajn, belan insignon, kaj kongres-libron. Tiu konsistis el la kutima angla gvidlibro al la urbo, kun 16 aldonaj paĝoj en Esperanto, el kiu kvar enhavis la programon. Ideo vere bonega, kaj ne ofte efektivigebla.

Sabaton posttagmeze okazis publika kunveno de edukistoj, aranĝita de la B.E.A. Eduka Komitato. Prezidis Prof. W. E. Collinson, kiu mencias, ke D-ro Dietterle posedas la nomojn kaj adresojn de 6730 Esperantistaj instruistoj en 60 landoj. F-ino Edwards el Bishop Auckland kaj F-ino Hogg el Ellesmere Port raportis pri la instruo de la lingvo en tiuj lernejoj. F-ino Edwards instruas Esperanton po duon-horo ĉiutage, F-ino Hogg po unu horo ĉiusemajne. Ambaŭ raportis bonegajn rezultojn. Sekvis vigla diskuto. Oni konsentis, ke estas necese, ke Esperanto estu instruata en la lernejoj, kaj ke por faciligi tion ni bezonas multe da geinstruistoj pretaj kaj kapablaj. Estus senutile peti permeson instrui Esperanton, se mankus kapablaj instruistoj; tamen se ili varbiĝos multenombre, ili mem estos pretaj enkonduki la lingvon en la temaron.

Samhore la B.E.A. Konsilantaro kunvenis en alia ĉambro. Oni raportis iom pli bonan staton financan. Okazis diskuto pri ebla pli efika kunagado inter B.E.A. kaj U.E.A. Komitato esploros tiun aferon, kaj ankaŭ la nunan organizon de la movado, kaj raportos al la konsilantara kunveno de 9 Julio.

Vespere la urbestro bonvenigis la kongresanojn en la urbdomo Birkdale, kie okazis tre ŝatata koncerto. Kantis F-inoj Edwards, Lyons, kaj Livingstone (Southportaninoj), kaj S-ro Harvey (Edinburgo). F-ino Iddon anstataŭis S-ron Merchant (kiu ne povis ĉeesti), ridigante la ĉeestantaron per vigla deklamo de ferakontoj. "La Erika Rolantaro"—S-ino de la Bruyère, F-inoj R. A. Sales, kaj F. M. Clark, S-roj G. W. Goodall kaj J. W. Chambers—prezentis teatrajon "La Vilao de l'Amo." Eĉ la nespertulo povis iom kompreni, kaj ĉiuj ĝuis la spektaklon tiel bone prezentatan.

U.E.A. kunveno okazis dimancon matene, kiam la membroj konsideris la nunajn malfacilaĵojn de la Asocio, kaj promesis helpi ĝin laŭ eblo. Tuj poste oni fotografiĝis en la urba orkestrejo. Sekvis la komuna lunco, ĉe kiu S-ro Robertson gratulis F-inojn Iddon kaj Kay kaj la Lokan Komitaton pro la bonegaj aranĝoj. Anino de la L.K.K. laŭlegis bondezirojn por la kongreso, kiuj alvenis el multaj partoj de la terglobo.

La Esperanta Diservo okazis en Christ Church je la tria p.t.m. Pastro P. H. Fearnley, M.A., ĝin kondukis, kaj Prof. Collinson prelegis.

Kiel temon li elektis Gen. ii. 1 : *Sur la tero estis unu lingvo kaj unu parolmaniero.* Post aludo al kelkaj epizodoj, per kiuj la juda folkloro ornamis la historion pri la Babelo Turo, la parolanto atentigis pri du veroj instruataj de la rakonto :

(1) La homa parolo—eĉ se ne laŭ efektiva origino, tamen fundamente kaj principe—estas unua. (2) La diverseco de lingvoj ofte kondukis al teruraj malpacoj, kaj detruis la eblecon de internacia kunlaboro.

Iu germana filologo diris, ke la ĉefaj funkcioj de la homa parolo rilatas al la unua persono—la esprimo de emocioj premantaj nin mem ; al la dua persono—la instigo al aliaj, ke ili agu aŭ sentu laŭ nia volo ; kaj al la tria persono—la formuligo kaj komunikado de faktoj. Kiel montris Malinowski, ĝi povas esti nur socia bru, montrilo de homa simpatio kaj solidareco ; kiel niaj banalaj demandoj pri sano kaj rimarkoj pri la vetero.

En la Biblio la Vorto ofte signifas la legon kaj ordonon de Dio. La *logos* de Johano estis tiu racia plano malantaŭ la krejaro, kiun poetoj, profetoj, filozofoj, kaj scienculoj, ĉiuj siamaniere provas kompreni. En la Nova Testamento la Vorto estas super ĉio mesaĝo, konsolo, kaj evangelio. La distingo kiun faris Jesuo en Joh. viii. 43 inter *lalia* (parolmaniero) kaj *logos* (vorto), memorigas, ke kiom ajn malsame ni esprimas ilin, niaj pensformoj (logika rezonado, geometriaj figuroj, kunmetaj ciferaloj aŭ muzikaj), kaj eĉ niaj emocioj (ĝojo, timo, kolero, jaluzo), estas fundamente parencaj. La historio pri la miraklo de Pentekosto instruas, ke ni devas proksimiĝi al kompreno de fremda lingvo el la vidpunkto de la propra lingvo, kaj ke ni povas kompreni la sentojn de aliaj nur el propra sperto—t.e., ni unue komprendas kaj kunsentas kiel individuoj.

En la dek-dua ĉapitro de Jugistoj ni trovas bonan ekzemplon de la fisekvoj de lingva malsameco. Cetere, eĉ hodiau ni ne estas sufiĉe toleremaj rilate tiujn, kies parolo laŭ provinca aŭ hejma idiomu povas porti al ili socian izoligon.

Kiam ekzistas ankaŭ helpa lingvo, komuna al ĉiuj, la lingva diverseco povas esti interesa kaj stimula. Kvankam nia individua kverko havas radikon profunde en la indiĝena tero, tamen ĝi povas vaste disetendi siajn branĉojn, por ke ĉiuj rasoj ripozu sub ilia ŝirmo.

Post la Diservo kelkaj iris al la militmemoraĵo, kien S-ino Blaisemetis kvinpintan florkronon kun la vorto "Esperanto." Je la sesa horo kunvenis anoj de la Unio por la Ligo de Nacioj, por priparoli la eblecon de agado rilate al Esperanto en tiu Unio. Oni raportis, ke la Eduka Komitato de la Unio jus akceptis la sekvantan rezolucion :

(a) Ke pro la malfacilaĵoj por internaciaj komunikadoj kaŭzitaj de la diverseco de lingvoj, estas, laŭ la opinio de la komitato, tre dezirinde eltrovi, se eble, internacion helpan lingvon.

(b) Ke, pripensante la nunan situacion rilate al kelkaj novaj lingvoj por internacia uzado, la Komitato opinias, ke kompetenta internacia aŭtoritato starigota de la Ligo devus studi la demandon, por ke ĝi rekomendu la plej bonan Helpan Lingvon por tiu celo."

Tiun rezolucion oni jam komunikis al similaj Unioj en 34 landoj.

Je la sepa horo okazis kunveno de grupaj sekretarioj kaj B.E.A. Lokaj Reprezentantoj, kiam S-ro Goldsmith priparolis la nuntempan

nombradon de Britaj Esperantistoj. Li emfazis ĝian gravecon rilate al grupa kaj loka agado, kaj multaj promesis helpi. (Ĉu vi mem jam plenigis kaj ensendis vian formulon?)

Vespere la kongresanoj amasiĝis en la urba orkestrejo, ĉar la orkestro aranĝis ludi "La Espero" kaj "Unu Lingvo, Unu Koro." Bedaŭrinde, tuj antaŭ la difinita horo ekpluvis, kaj ĉiu forkuris por sin ŝirmi sub la balkono de la Cambridge Halo. Tamen, kiam ekaŭdigis la bone konata himno, la gesamideanoj ekkantis plenpulme, je la surprizo de aliaj ŝirmigantoj. Multaj interesigis pri la nekonata lingvo, kaj sekvis disdonon de kantfolioj kaj informo.

La Ĉiujara Kunveno de la B.E.A. okazis lunden matene en la urbdomo, Birkdale. Prezidis S-ro Robertson. S-ro Goldsmith raportis, ke dum la lastaj du monatoj aferoj iomete pliboniĝis, sed ke ĝis nun la garantio ne estas sufiĉe alta, kaj pro lia peto la ĉeestantaro garantiis pluajn £40. (Post reveno al la oficejo, tamen, oni eltrovis, ho ve! ke garantioj ĝis £13 estas nur duplikatoj, kaj ke sekve la efektiva pligrandigo estas nur £27.) Plua helpo tiurilate estas tre forte bezonata.

Oni aludis la ĵusan murdiĝon de la Japana Ĉefministro, kaj decidis sendi al la Japanaj samideanoj kondolencan telegramon.

Vespere okazis la Balo. La urbestro bonvenigis la kongresanojn en la Cambridge Halo, kie li gastigis ĉirkaŭ tri cent personojn. Oni aranĝis ĉion tre lukse, kaj la halo aspektis belega. La dancorkestro preskaŭ kaŝiĝis inter floroj kaj verdaĵoj. Senlimaj trinkajoj kaj mangajoj estis haveblaj, kaj la tuta afero estis treege memorinda sukceso. Tuj antaŭ ol batis la noktomezo, la urbestro denove alparolis siajn gastojn. S-ino Blaise, kiu antaŭ dudek jaroj instruis la unuan Esperantan kurson en Southport, dankis lin pro la bonaj kaj luksaj aranĝoj. Si diris, ke ĉi tiu estas la plej feliĉa el ĉiuj kongresoj, kaj ke la gastamo de la urbestro estos ĉiam memorata. S-ro Currie el Burnley same asertis, ke neniu urbo tiel bonkore kaj sindoneme gastigis kongreson, kaj per tiu diro li esprimis la dankon de la tuta kongresanaro. Preskaŭ leviĝis la tegmento dum la kantado de "Li estas bonegulo." Finiĝis la dancado je la unua horo, kaj komenciĝis la adiaŭoj de tiuj, kiuj devos forveturi frumatene.

Marde kelkaj samideanoj ekskursis al Ullswater. La ceteraj ĝuis la belegan veteron en la urbo, farante uzon el la senpagaj biletetoj. Iom post iom la kongresinsignoj (fabrikitaj de loka grupano) maloftiĝis. La kongreso finiĝis, kaj la multa laboro de la L.K.K. estis kronita per brila sukceso.

Vivu Esperanto en Southport! Kaj vivu ties urbestro, kiu tiel bonkore nin bonvenigis.

Mr. W. P. Merrick, treasurer of "Esperanta Ligilo" asks us to thank most heartily all those who contributed to the church collections for the blind. That held during the 27-a Jara Kongreso de la Skota Esperanta Federacio at Perth on May 22 amounted to £4, and that at Southport on Whit Sunday to £6 15s. 0d., together a most valuable addition to the resources of the magazine just when it is particularly needed.

24th BRITISH ESPERANTO CONGRESS

The 24th British Esperanto Congress will be held at Oxford during Easter, 1933. The Local Congress Committee consists of Miss D. Asbee, F. B. Bourdillon, J. F. Brendel, Miss G. Chaundy, Mrs. E. Cox, B. Evans, Miss D. Finch, C. C. Goldsmith, H. Messer, D. G. Perry, W. J. Rayson, N. C. Smith, H. W. Watson. Arrangements are already well in hand, and the committee hope that this will be the most successful of all British congresses.

The secretary is J. F. Brendel, 89 Dene Road, Headington, Oxford. Tickets will be 3/6 up to March 1st, 1933, and after that date 5/-. For young people under 18, the congress fee will be 1/6. The first two enrolled are L. Chilvers, Nottingham, and E. K. Jayne, Croydon.

The B.E.A. is arranging for a Ĉe course to be held in Oxford at the same time. Details will be announced later.

ESPERANTO PLAY IN LONDON

Is Esperanto becoming such a universal language that omnibus conductors, policemen, and charladies, will speak it as a matter of course?

That is the question I asked myself yesterday during Madame Elizabeth de la Bruyère's production of "La Vilao de l'Amo," a play in Esperanto adapted from the French. It was performed at the Women's Service Hall, Tufton Street, Westminster, and I could not see an empty seat.

All the members of the audience were keen Esperantists, and followed the play with the greatest enjoyment. Sir Robert Young, formerly Deputy-Speaker in the House, and Lady Young were there, and the audience also included the Harley Street specialist, Dr. Franklin, Mr. Scott Duckers the solicitor, and several French and German visitors to London.

Madame Elizabeth de la Bruyère took in the play the part of a Frenchwoman who lets her villa in the South of France to a professor and his daughter (played by George Goodall and Renée Angèle Sales). Other parts were filled by Margaret Florence Clark and William Chambers.

All seemed to be word-perfect, and played with such clarity that I, a foreigner among Esperantists, was able to follow the play with perfect ease.

El "The Sunday Times," 29 Majo, 1932.

MI AMAS VIN

We are learning Esperanto,
My Evangeline and I;
And we find it interesting,
Not the least bit hard and dry.
And although we've got no teacher,
And our study short has been,
I can say to you a phrase or two
Like this: *Mi amas vin.*

We are learning Esperanto,
My Evangeline and I;
And although we are not clever,
Still, we mean to have a try.
One great beauty of the language
We've already clearly seen,
For what more sweet than to repeat
The words: *Mi amas vin?*

We are learning Esperanto,
And our method's best by far,
For we simply take a sentence
And then find out where we are.
What's the use of words a thousand,
If you don't know what they mean?
No, we take a few, just one or two—
Or three: *Mi amas vin.*

We are learning Esperanto,
'Tis a language we admire,
But I sometimes tell Evangeline
We know all we require.
For when *Mi amas vin* I cry,
With lips on hers that lean,
She low replies, with downcast eyes:
Kaj mi, mi amas vin.

LITERATURA MONDO,

la eldonejo, kiu dum la unua jaro de sia ekzisto pruvis, ke ĝiaj libroj konsistas nur el librospeco

valora, bela, bonstila
ofertas al vi siajn lastajn eldonajojn

Verkojn de K. KALOCSAY :

Eterna Bukedo, internacia poemantologio el 22 lingvoj, 116 aŭtoroj; 220 poemoj, bindita en ledimitaĵo. 12/9, afranko 6p.

Lingvo, Stilo, Formo studioj pri la rimo, vortkunmeto kaj aliaj lingvaj problemoj de la famekonata stilmajstro. prezo bindita 5/-, brošurita 3/-, malkara eldono 1/6, afranko 3p.

Strečita Kordo originala poemaro. La plej perfektaj poemoj en Esperanto. prezo bindita 6/-, brošurita 4/6, afranko 4p.

Rimportretoj mokaj kaj sarkasmaj poemetoj pri 55 famaj Esperantistoj kun portretoj de ĉiuj el ili. La plej amuza kaj instrua libreto. prezo bindita 4/6, brošurita 3/6, afranko 2p.

Aliaj verkoj :

La Pentroarto en la Malnova Hungarujo, en duonleda bindo, kun 96 tutpaĝaj ilustraĵoj; la plej bela esperanto-libro. bindita 16/3, afranko 6p.

Francisko Szilagyi : *Trans la Fabeloceanon*; originalaj noveloj. Plej simpla lingvajo, kun multaj ilustraĵoj. bind. 5/6, broš. 3/3, afranko 3p.

Mendu ĉe

Brita Esperantista Asocio
142, High Holborn, London, W.C.1.

“SEEING BRITAIN AND IRELAND.”

A programme containing over 500 tours with prices ranging from £4 6s. 0d. for 8 days.

“HOLIDAYS ON THE CONTINENT.”

Over 1,000 arrangements with prices for 8 days from £4 10s. 0d.

PLEASURE CRUISES PROGRAMME.

Copies of the above can be obtained from :—

DEAN AND DAWSON, LTD.,
81, Piccadilly, London, W.1.

Telephone : GROSVENOR 2873.

LA INTERNACIA FUMAĜO !

Cigaredo
Esperanto

(The Esperanto Cigarette)

THESE CIGARETTES ARE WARRANTED
HAND-MADE FROM A BLEND OF THE
PUREST VIRGINIAN TOBACCO, AND
EVERY PRECAUTION IS EXERCISED
IN THEIR PREPARATION TO ENSURE
A UNIFORM & HIGH-GRADE ARTICLE

Price, per packet of 20,
1/6, post free
for 10 packets,
14/-, post free

OBtainable from the B.E.A.

SOLE PROPRIETORS :
BUCHANAN, SCOTT & Co
Glasgow.
(WHOLESALE ONLY).

TAGLIBRO DE LA B.E.A. AUTOMOBIL

Aprilo 6: Vizitis la grupon en **Birmingham**, kaj lokajn libristojn. 9: En **Chelmsford**. Esperantistoj el sep urboj en Essex kaj Suffolk decidis fondi Orientan Federacion. Vendoj: £1.7.6. 14: **Cheltenham**. Renkontis 25 membrojn de lokaj kursoj: la grupo estas juna kaj vigla. Vendoj: 9/10. 15: **Chesterfield**. 120 infanoj en Central Modern Senior Girls' School entuziasme pruvis, ke ili bone lernas nian lingvon sub la instruado tie ricevita. Vespere, festa kunveno de la loka grupo: ĉeestis 18. Vendoj: £1.19.0. 16: **Tewkesbury**. Federacia kunveno (jam raportita). Vendoj: 19/9. 21: Vizito al 35 infanoj en Infana Koopera Gildo, **Tottenham**. 23: Konferenco en **Swanwick** (jam raportita). Vendoj: £2.5.6. Unu nova membro. 25: Unua leciono al 60 infanoj en Pleasley Hill Senior School, **Mansfield**. Oni esperas enkonduki Esperanton en la temaron. 29: Parolo al 30 membroj de Junula Koopera Gildo, **Tottenham**. 30: Konferenco de Suda Federacio, **Farnham**. Ĉeestis 45, vendoj: £1.19.1. Majo 10: **Dorking** Rotaria Klubo. Ĉeestis 23. Unu rotariano donis al ĉiu lernolibreton, kaj loka librovendisto mendis librojn. 14-17: B.E.A. Kongreso en **Southport**. Vendoj: £18.7.11. Tri novaj membroj. (Raporto alipage). U.L. 8154.

I break off the diary at this point to record some personal impressions of a visit paid by my wife and myself to the north. Starting soon after 4 a.m. on *May 18th* we visited some Esperantist friends in **Grantham**, and in the evening reached **West Hartlepool**. The group is small, but has several energetic workers. The want of a meeting-place has hindered progress, but a suitable room has now been found, and should greatly help. Crossing the border on *May 19th*, we visited a meeting in the Miners' Institute, **Bellshill**. Representatives from **Motherwell** and **Lanark** were present, and enthusiasm was evident. In all three towns there are classes making good progress, and filled with the spirit of the movement. A long report appeared in "The Bellshill Speaker." The Scottish congress in **Perth**, *May 20th-22nd*, though 40 down in number on last year, was generally agreed to be one of the most enjoyable on record. All events went without a hitch, and reflected great credit on the young group that had made itself responsible for them. The sales in proportion were well up to the standard set by Southport. A 15 minutes' talk was given to the Executive of the Perth and Kinross branch of the Educational Institute of Scotland, and each member received a copy of "Esperanto in the School," and "Aims and Claims." A first result was a specimen lesson to 50 girls and some teachers in Perth Academy. On *May 23rd* we met the **Buckhaven** and **Methil** group. Many members are out of work, nevertheless they meet for two hours twice weekly to learn the language. Here, as in Bellshill, the enthusiasm displayed in spite of adverse circumstances was an example and an inspiration. The group in **St. Andrews** is small, but healthy, as evidenced by sales on *May 24th*. "St. Andrews' Citizen" published a report of the meeting and an interview in two full columns. The **Edinburgh** society had sent out 130 cards of invitation for *May 25th*, and a large meeting resulted. Several strangers were present, and seemed interested. Sales were poor—probably many present had already made purchases in Perth. News of the illness of Mr. and Mrs. Warden and Mr. Page cast a shadow over the proceedings; the latter, however, was already making good recovery. The **Burntisland** Group felt it inopportune to hold a meeting, but on *May 26th* we enjoyed a talk with four members over a cup of tea. In **Dundee**, on *May 27th*, as last year, the group showed itself very much alive. The warmth of our welcome was almost embarrassing. Some Scottish songs by Pastro Lees were the crowning point of a jolly evening—the time passed all too quickly. At **Paisley** (*May 28th*), the room was packed; two faithful enthusiasts from Motherwell came sixteen miles to swell the number, and certainly did not get home till morning. The group is young, but its vigour and life may well be the envy of a larger society. Though the members are far from wealthy, they buy books steadily throughout the year, and on this occasion also were well ahead (see figures below). I do not hesitate to find some connection here, for the literature is the soul of the language, and its study is one indication of healthy Esperanto life. At the Friends' Meeting in **Glasgow** (*May 29th*) we received news of a meeting of the Friends' Esperanto Society held the previous week in London. In **Saltcoats**, in the afternoon,

we met seven local group members and three from **Darvel**. It is a courageous thing for this small group to invite the Scottish congress for 1933, but we prophesy success. "The Ardrossan and Saltcoats Herald" published a long interview, and the principal bookshop took a supply of books. After the large meeting last year it was a keen disappointment that this year the groups and classes in **Glasgow** and **Partick** combined could not muster up more than six to their tea on *May 30th*. The district has been badly hit by trade depression. Crossing the border again, we came to **Carlisle**, where the meeting (*May 31st*) was small, but showed good material. Arising from last year's visit, a class has been held regularly, and a conversational group has just been formed among its members; the two will work in harmony. **Wigton** Friends' School welcomed a repeat visit on *June 1st*. The whole school, including the staff, assembled for a specimen lesson. The group in **Blackburn** has recently suffered several losses owing to removals. Nevertheless an unexpectedly large number assembled, and seating accommodation proved to be a real difficulty. Visitors from **Darwen** also were present. This group is one of the few in Britain with a club-room of their own. At **Penketh** Friends' School one form was temporarily absent on the date of our visit (*June 2nd*), but we received the very warmest welcome from the remainder of the school, who with the whole staff appeared to enjoy an hour of Esperanto. At the William Stockton School in **Ellesmere Port** 150 children showed by their response to questions what splendid progress they had made under the able tuition of their teacher. The headmaster stated that H.M.I. in a recent visit had made a very favourable report, and had advised the retention of Esperanto in the school curriculum. The **Chester** group (which had originated from old scholars from the E.P. school), though small as yet, was flourishing, and great things may confidently be expected from this direction in the future. A flying visit to **Sibford** school concluded the tour.

I have intentionally mentioned no names, for it would be impossible to name all the many we met in every group whose steady and devoted work were an inspiration to us, and to mention some only would be invidious. Nor have I mentioned those who kindly gave us hospitality, to whom I hereby give warmest thanks. Everywhere we received a real British welcome in downright Esperanto fashion. We hope that the visit has been useful to the groups concerned—we have ourselves everywhere received kindnesses which will be happy memories for the rest of our lives.

It was a matter for regret that Aberdeen alone of all the Scottish groups was unable to arrange for a visit, also that only six new members were recruited for the B.E.A. (Good intentions, unfortunately, do not count in statistics). For this, however, economic conditions must be blamed. Here are approximate figures of attendance and sales (in addition to many books placed on sale or return):—

		£	s.	d.		£	s.	d.		
W. Hartlepool	17	..	0 8 0	Saltcoats	..	10	..	—
Bellshill	25	..	1 4 0	Glasgow and Partick	..	6	..	0 5 0
Perth Congress	108	..	6 7 9	Carlisle	..	15	..	0 8 0
Perth (E.I.S.)*	30	..	1 0 0	Wigton School	..	70	..	—
Perth Academy	50	..	0 5 0	Blackburn	..	30	..	0 17 6
Buckhaven and Methil	25	..	0 15 0	Penketh School	..	70	..	—
St. Andrew's	15	..	1 0 0	Ellesmere Port School	..	150	..	—
Edinburgh	60	..	0 17 6	Chester	..	15	..	0 18 7
Burntisland	4	..	—					
Dundee	35	..	0 18 0					
Paisley	35	..	2 12 0					
									£17 11 4	

*Paid for by the Scottish Federation.

M. C. B.

EDZIGOJ

Bing—Pears.—Je Pentekosto, Harold F. Bing kun Elizabeth M. Pears.

Watson—Burgess.—Je Junio 11, Bruce Watson, instruisto de Lutona Grupo, kun Doris Burgess.

MORTOJ

Carter.—Je 9 Majo, Richard Carter en Liverpool. Li estis Fratulo de B.E.A. kaj laboris por la movado en Britujo, Afriko, kaj Kanado.

Shackleton.—Je 17 Majo, F-ino E. Shackleton, dum multaj jaroj membro de B.E.A., Burnley Grupo, kaj Lancashire kaj Cheshire Federacio.

Sopher.—Je 29 Majo, P. I. Sopher el la Glasgova Grupo. Vigla kunlaboranto dum multaj jaroj.

OUR BOOKSHELF

Books starred are stocked by the B.E.A. Postage extra. Others should be ordered not from the B.E.A., but from the address given.

***Senbedaŭre Amo Rabas.**— Takeo Arišima. El japana lingvo tradukis Tojosato Tooguu. Japana Esperanta Instituto, 103 pp., tole bindita, 2\$. 9p.

Ĉi tiu libro estas interesa, ne nur pro sia enhavo, sed ankaŭ pro sia eco kiel homa dokumento. La aŭtoro (jam konata al la Esperantistaro per la novelo *Deklaracio*) iam estis Kristano, sed trovinte, ke en la eklezio de Kristanismo li nerefuteble apartenas al la hipokritularo, ne konas Dion, kaj neas kaj subpremas gravan elementon de sia propra naturo, li ribelis; kaj ĉi tiu libro estas pasia apologio de la "individueco," la instinkto, kontraŭ troaj postuloj de aŭtoritato, socio, intelekto, kaj kutimo. "Karno kaj animo vivas en la individuo kiel unuo nediferencigbla." Same la aŭtoro provas montri, ke la supozita kontraŭeco inter individuo kaj socio, amanto kaj amato, efektive ne ekzistas. La titolo estas adaptajo de la Paŭlaj vortoj: "Amo senbedaŭre donas." Por S-ro Arišima "amo" signifas kvazaŭ la samon kiel "instinkto" (p. 56): ĝi estas la kompleta esprimo de la fundamentaj homaj aspiroj kaj deziroj. La aŭtoro diras, ke li "volas atingi la tombon, perdinte nenion kaj elguinte ĉion." La anstataŭigo de la vorto *donas* per *rabas* signifas, ke la amanto mem pliriĉigas per sia amo al alia; amo estas ago ne nur altruisma, sed ankaŭ kaj nepre egoisma. Du amantoj reciproke sin riĉigas.

Oni povas havi diversajn opiniojn pri la demando, ĉu S-ro Arišima sukcesis bone kaj klare esprimi siajn ideojn. Al mi mem, almenaŭ kelkaj punktoj ŝajnas iom malprecizaj: ekz., pri la rilato inter amo kaj instinkto, kaj inter instinkto kaj intelekto. Sed neniu povas dubi pri la fervora konvinko de la aŭtoro. Rilate la ĝeneralan temon, la antaŭenema pensulo certe konsentos pri la neceso, ke ni utiligu niajn instinktajn energiojn, kaj ne perfotrigu ilin en vanan sinoferemon aŭ asketismon: tio estas ja la tendenco de moderna penso psikologia kaj etika. Sed oni ne forgesu, ke por saĝa utiligo de la instinktaj fortoj nepre necesas la helpo de la intelekto. Se la intelekto estas malbona mastro, ĝi tamen estas utilega servanto; kaj eble tiu

fakton la aŭtoro ne sufice substrekis. Sed ni bone komprenas, ke lia propra historio estas kaŭzo de tio. . . . Mi ne konas la cirkonstancojn de lia sinmortigo, sed laŭ psikologia vidpunkto oni povas hazardi la konjekton, ke iu ankoraŭ ne forigita malklara (eĉ nekonscia) sento de kulpo ludis rolon en tiu tragedio.

Bedaŭrinde, ankaŭ la tradukinto mortis antaŭ la apero de la traduko. Sendube tio estas la kaŭzo de kelkaj eraretoj en la teksto. Tamen entute la libro estas inda kaj valora aldonon al la filozofia kaj psikologia fako de nia literaturo.

J. C. F.

Mia poezio.—Original poems by Rafael de San Millán Alonso. Published by Hispana Esperanto-Asocio, Sagasta 10, Madrid, 1932. 64 pp., 1.50 sv. fr.

I think that this is really the very worst volume of original Esperanto poetry that I have ever read. It is, however, impossible to be sure. The book is introduced by J. Mangada Rosenörn.

K. R. C. S.

***Verda Karto.**—Translated from the Japanese of Eisaburo Ishihara by H. Jamanaka. Published by Japana Esperanto-Instituto, Tokio. 183 pp. Price 2/9.

This is a prize-winning film novel from Japan, purporting to present a picture of society fifty years hence. From the point of view of the film fan it is probably full of incident and excitement, and to anyone interested in modern Japanese thought it is remarkably interesting reading. Whether the machine, at its present rate of development, will soon destroy man, is a question which evidently looms also for the Eastern mind. The growing power of women in society, the rise to power of the proletariat, these are problems which are very near for Japanese popular thought. The problem of the conception of God is to the fore, too. These may seem odd ingredients for a film novel, but here they are, and the book is well worth reading and consideration.

The translation from the Japanese is very good indeed; *pojno*, *siesto*, *adoleska*, and *abnorma* are the most interesting of the few unofficial words.

K. R. C. S.

***Tra Sovaga Kamčatko.**—*Sten Bergman. El la sveda tradukis Birger Gerdman. Eldona Societo Esperanta. 276 pp. bind. 6\$. 3p., broš. 4\$. 9p.*

Jen interesa verko, plena de mirigaj detaloj pri vastegaj stepoj, timigaj neĝostormoj, kaj preskaŭ netolerebla malvarmo, majstre pentritaj de la aŭtoro, kiu dufoje kun sia heroa edzino slede aŭ skie travojaĝis tiun preskaŭ nekonatan landon, kolektante materialon por sveda muzeo.

De la komenco ĝis la fino la aŭtoro tenas nian atenton. Ne ofte oni trovas literaturajon tiel interesan kaj instruan. Li donas vivon al ĉiu detalo: jen la leganto ridas kun li, jen same partoprenas la terurajn stormojn kaj aliajn aventurojn, kiuj konstante akompanis la vojaĝadon. Oni ne povas ne admirri la nevenkeblan persiston de la du esploristoj: ankaŭ la malsataj sledhundoj elvokas kompaton pro sia doloriga laboro.

